

# Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭde la 9-an de januaro 2020 per Skype.

(Protokolo aprobita la 12-an de marto 2020)

## Partoprenis:

Amelie Matt en Tromsø

Herman Ranæs en Trondheim

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim ekde tagorda punkto 3. (ricevis resumon pri la antaŭaj punktoj)

Douglas Draper en Oslo dum la tagordaj punktoj 2. kaj 3.

Mario Machlik en Tromsø

Bård Hekland en Bergen ekde la finiĝo de la interkonsiliĝo (ricevis resumon pri la diskutoj)

## 0. Tagordo

Aprobita.

### 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 2-an de decembro

Jam aprobita pli frue per retaj respondoj, kun eta korekto.

### 2. Partopreno de la Oslo klubo al la kostoj de la oficejo

Nur Douglas Draper reprezentis la klubon en Oslo (kaj la oficejon). Li diris, ke jam delonge la klubo en Oslo pagas konstantan kaj fiksan sumon (15.200,-), kiel kontribuon por la elspezoj de la oficejo. Tiu sumo ne ŝanĝiĝis dum multaj jaroj, do aktualas altiĝi ĝin iom. Ĝis nun la enspezojn, kiujn ĉefe oni ricevis pro luigado de la kunvenĉambro por kunvenoj de la loĝejaro kaj pro tranoktado en la oficejo, ni dividis inter NEL kaj la Oslo-klubo (40% kaj 60%). La kasisto de NEL trovas tiun interkonsenton komplika administri kaj proponas forigi. La estraro pensas, ke ni tamen devus trovi iun sistemon, kiu favoras al la klubo pro la laboro kion ĝi faras por ricevi enspezojn (ordigado, purigado de la kunvenejo ktp.) Ebla solvo (se ne eblas dividi la enspezojn) estas, ke la enspezojn ricevu la klubo kiel kompenson de ioma altiĝo de la fiksa kontribuo (ĉirkaŭ per la duono de la atendeblaj enspezoj).

### 3. Membroregistrado

La registradon de la membroj administras Douglas Draper en la oficeja komputilo per la programo *LibreOffice Base*. Kvankam estis menciitaj aliaj programoj, kiuj eble pli bone funkcias kaj povus esti administrataj de pluraj homoj, la enkonduko de tiuj programoj postulus de ni tro da laborhoroj. Dume la nuna programo funkcias kontentige. Plej gravas, ke ni regule faru sekur-kopiojn laŭ ĝusta maniero. Herman kontaktos la oficejon ene de la venontaj tagoj kaj helpos aranĝi tion.

### 4. Jarkalkulo 2018

La estraro dankas al la kasisto, kiu sendis al ni la jarkalkulon 2018 (kiun Anne Karin ne povis pretigi) kaj por komparo ankaŭ la jarkalkulon en 2017. Ni pensas, ke la jarkalkulo havas tiel klaran kaj ordan sistemon kaj fariĝis pli konciza ol antaŭe. Sola komento estis pri la 5a linio de la punkto « Rimedoj » : « Luigo kaj donacoj (oficejo) ». Estus bone menciiti la kontribuon de la Oslo-klubo aŭ en aparta linio, aŭ en la titolo de la linio (ne nur en la noto). Temas ja pri la plej granda sumo inter rimedoj post la membrototizoj.

### 5. Jarraporto 2018

La jarraporto de 2018 jam estis preskaŭ tute preta antaŭ nia landa kunveno, sed mankis la parto pri ekonomio kaj la resumo. Sen la jarkalkulo ni ne povis finprepari ĝin, kaj la landa kunveno decidis trakti ĝin dum la venonta landa kongreso kune kun la jarraportoj 2019 kaj 2020. Mario petos al Claude skribi la parton pri ekonomio, kaj li mem verkos resumon ĝis la venonta estrara interkonsiliĝo.

### 6. Aliro al kontoj en DNB kaj Skagen

La estraro de NEL donas alirrajton al la kasisto (Claude Rouget, Rypevegen 68, 9015 Tromsø) kaj al vicprezidanto (Jardar Eggesbø Abrahamsen Asbjørn Øverås vei 14. G. 7036 Trondheim) al la kontoj 0530.42.32724, 7877.06.79590 ĉe la banko DNB. La samaj personoj ricevu ankaŭ aliron al la kontoj de NEL en la banko Skagen.

***Styret til Norsk Esperantoforbund vil gi disposisjonsrett for kasserer (Claude Rouget, Rypevegen 68, 9015 Tromsø) og nestleder (Jardar Eggesbø Abrahamsen Asbjørn Øverås vei 14. G. 7036 Trondheim) til kontoene 0530.42.32724, 7877.06.79590 i banken DNB.***

***De samme personene skal få disposisjonsrett til kontoene til Norsk Esperantoforbund i banken Skagen.***

### 7. Seminario 2020

Ni planas skajpan seminarion en la aŭtuno (oktobro/novembro) 2020. Mario skribos al nia membrogazeto pri tio, petante kontribuojn pri temoj, prelegoj, invitindaj personoj.

### 8. Eventualajoj

Amelie raportis, ke la Tromsø-klubo ricevis retleteron de la Eventa Servo por registri siajn klubkunvenojn, diversajn eventojn. En la retejo troviĝas jam plurcent E-eventoj kiuj okazas kaj okazos en la tuta mondo. Oni tamen registru tie siajn kunvenojn nur se tiuj estas fiksitaj kaj ne ŝanĝiĝas lastmomente pro diversaj kialoj.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 21:45

La venonta interkonsiliĝo okazos la 6-an de februaro 2020 je la 20.30.

Raportis Mario Machlik